
# Eŭropa Bulteno

**Julio 2006**
**UK eldono**



***Karaj gelegantoj,***
***En viaj manoj troviĝas speciala eldono de Eŭropa Bulteno, kiu prezentas Eŭropan Esperanto-Union.***
***Ni prezentas ankaŭ novan hejmpaĝon de EEU ĉe: [www.europo.eu](http://www.europo.eu)***
***En ĉi tiu numero vi povas tralegi pri nia agado en 2005 kaj 2006. Krom la aktivadoj de d-ro Seán Ó Riain, prezidanto de EEU; Zlatko Tišljar, sekretario de EEU kaj Peter Baláž, estrarano de EEU, certe estas menciindaj meritoj ankaŭ de Flory Witdoeckt kiu faras ege gravan kasistan laboron, kaj Georgo Handzlik kiu faras EP-laboron kune kun Margareta.***
***En la Bulteno vi trovos ankaŭ informojn pri la 7-a kongreso de EEU, kiu okazos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007 en Maribor Slovenio.***
***Bonvenon en Maribor!***
***Mi deziras al vi agrablan legadon kaj gajajn renkontojn kun viaj geamikoj!***

***Vesna Obradović***

**EŬROPA ESPERANTO-UNIO** estas unuiĝo por Esperanto en landoj de Eŭropa Unio. Unuaj ideoj pri tio kaj neformalaj renkontiĝoj de Landaj E-Asocioj el EU-landoj komenciĝis antaŭ pli ol 20 jaroj kaj kutime okazis dum UKoj. Poste oni iniciatis ankaŭ eŭropajn kongresojn kiuj okazis ĉiun duan au trian jaron kiam EEU diskutis planojn pri agado en EU kaj en la jaro 2003 startis la ideo fondi Bruselan Komunikadcentron en kiu por eŭropaj interesoj aktivus profesia teamo. Baze de malavaraj donacoj de multaj eŭropaj esperantistoj kolektiĝis pli ol 100.000 eŭroj kiuj ebligis la enpostenigon de du profesiuloj dum du jaroj (2003-2005). Fine en 2005 EEU ankaŭ oficiale registriĝis en Bruselo kiel eŭropa neregistara organizaĵo, kiu ekde tiam agadas plene memstare kiel partnero en diversaj projektoj kaj oficiala reprezentanto de eŭropaj esperantistoj ĉe Eŭropa Parlamento kaj aliaj politikaj kaj sociaj instancoj.
Laŭ la statuto EEU-un gvidas Ĝenerala Asembleo kiu konsistas el po unu membro el ĉiu lando de EU, kie ekzistas Esperantaj organizaĵoj kaj la estraro, kiu nun estas kvinmembra. La asembleo kunvenas unu-foje jare au dum la UKoj aŭ dum la propraj kongresoj. Ekzistas ankaŭ observantaj membroj. Tio estas landaj asocioj en aliaj eŭropaj landoj kiuj ankaŭ pagas kotizojn, povas partopreni en ĉiuj agadoj samvalore kun aliaj, nur ili ne povas voĉdoni kiam temas pri decidado.
La estraro estas elektata je 3-jara periodo. La nuna estraro elektita en 2005 konsistas el d-ro Sean O Riain, (prezidanto, Irlando), Zlatko Tišljar (sekretario, Slovenio), Flory Witdoeckt (vicprezidantino kaj kasistino, Belgio), Georgo Handzlik (membro, Pollando), Petro Balaž (membro kaj teknika sekretario, Slovakio).
EEU informas la publikon per diversaj retpaĝaroj (la propra: [www.europo.eu](http://www.europo.eu) , kaj komunaj kun UEA kaj TEJO: [www.lingvo.org/europo](http://www.lingvo.org/europo) , [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) )kaj per la propra Eŭropa Bulteno, kiu aperas monate en elektronika formo (www.lingvo.org/bulteno). Aktivaj diskutoj kun la asembleanoj okazas dum la tuta jaro tra la forumo: ĝenerala-asembleo-de-eeu kaj kun aliaj interesitaj eŭropaj esperantistoj tra la forumo Eŭropo. Pri la sekva kongreso informas konstante aktualigata retpaĝaro [www.esperanto-maribor.si](http://www.esperanto-maribor.si)
La nunaj regulaj membroj de EEU estas Esperantaj asocioj en ĉiuj EU-landoj krom Cipro, kie ne ekzistas esperanta asocio kaj Estonio, kies landa asocio ne aliĝis ankoraŭ. La observantaj membroj estas Kroatio kaj Svislando.
La baza strategio de poresperanta agado en la periodo de ĉi tiu estraro, kiam feliĉe unu esperantisto (Margareta Handzlik) estas membro de Eŭropa Parlamento, estas sisteme informadi ĉiujn membrojn de Eŭropa Parlamento pri Esperanto per interesaj leteroj pri eŭropa lingva politiko kaj invitoj al seriozaj aranĝoj organizataj de esperantistoj en Eŭropo. Tiusence ni jam sendis 3 tiajn leterojn en ĉiuj naciaj lingvoj. En la sekva jaro ni sendos pliajn kaj en la fino ankaŭ aparte kreitan DVD-filmon »Kia povus esti Eŭropo«, kiu montros Esperanto-movadon kaj ties kulturon, por kiu filmas materialojn skipoj en UK kaj IJK.
EEU daŭre zorgas pri du kampanjoj: kolekto de diskriminaciaj dunganoncoj, kiu montras kiom da anoncoj aperas en Bruselo postulante denaskan konon de la angla lingvo kaj pri kampanjo: DVD-filmo »Kia povus esti Eŭropo«, por kiu ni petas kontribuojn de eŭropaj esperantistoj (vidu pri tio apartan artikolon).
Antaŭ la EEU-kongreso en Maribor 2007 ni planas renkonton de honora kongresa komitato kun la slovena registaro, dum kiu ni volas proponi al la slovena registaro projekton pri Esperanto por la Eŭropa Komisiono, kiun la slovenoj provu realigi en komenco de 2008, kiam Slovenio prezidos EUn.
Unu el gravaj aktivadoj de EEU estas esti reprezentitaj en laŭeble multaj eŭropaj sciencaj kaj politikaj kunvenoj kie la temoj rilatas al lingvoj kaj egalrajteco de popoloj kaj minoritatoj. (Zlatko Tišljar)

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
Finredaktita: la 15-an de julio 2006.; Redaktorino: Vesna Obradović.
En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljar, Peter Baláž, kaj Vesna Obradović.
Leterojn kaj komentojn sendu al la seretario de EEU: [zlatko.tisljar@azm-lu.si](mailto:zlatko.tisljar@azm-lu.si)
Kontaktoj: [komunikadcentro@esperanto.org](mailto:komunikadcentro@esperanto.org) kaj [vesna.obradovic@gmail.com](mailto:vesna.obradovic@gmail.com) Retpaĝo: [http://www.lingvo.org](http://www.lingvo.org)

## AGADO DE LA ESTRARO EN 2005-6

**D-ro Seán Ó Riain, prezidanto de EEU**




La interna laboro de la EEU-estraro jam menciitas en la raporto de la sekretario. Krome, la prezidanto publike reprezentas EEU, farante prelegojn pri lingva justeco kaj eŭropa identeco: dum la Nitobe-simpozio en Vilno; en Parizo novembre 2005 (publikigita en "Les Langues Modernes"), en Londono februare 2006, en Bruselo aprile kaj junie 2006, en Parma kaj Florence julie 2006. Li verkis unupaĝan resumon de la raporto GRIN, kiu sendatas en siaj lingvoj al ĉiuj membroj de la Eŭropa Parlamento kaj al ĉiuj naciaj parlamentoj de EU, kaj kunordigas tiun agadon kun Profesoro Grin. Li regule kunvenas kun oficistoj de la Eŭropa Komisiono en Bruselo por diskuti lingvopolitikon, kaj verkas artikolojn kaj librorecenzojn pri ĝi. Li prelegis al svedaj kaj danaj esperantistoj en Malmö maje 2006. Kun UEA-prezidanto Renato Corsetti, kaj kunlabore kun EP-anino Margareta Handzlik, li invitis ĉiujn EP-anojn al la UK en Florenco. Kun Etsuo Miyoshi li preparas diskuton kun franclingvaj EP-anoj en Bruselo la 26.9. 2006, okaze de Eŭropa Tago de la Lingvoj.



**Zlatko Tišljar, sekretario de EEU**

Gvidis sekretariajn laborojn, preparis raportojn kaj dokumentojn, kunvokis estrarkunvenojn. (tri fizikaj kunsidoj en aprilo en Kolonjo, en aŭgusto en Vilnius kaj en januaro en Bruselo kaj 5 Skype-kunsidoj) kaj la asembleon en Vilnius.
Kontrolis la tekstojn kaj redakcian laboron de Eŭropa Bulteno kaj kontribuis en ĉiu numero per iu artikolo. Gvidis korespondadon kun LA-oj kaj kun ekstero (interkorespondado kun Ian Figel kaj Janez Potočnik – komisionanoj de EU-komisiono), ellaboris projekton por financado flanke de EU kaj trovis 6 partnerojn por ĝi. (Nun ni atendas la decidon de EU Komisiono). Agadas kiel prezidanto de LKK de la Maribora kongreso de EEU kaj gvidas kunsidojn, vizitas diversajn partnerojn, faras planojn. Reprezentis EEU en EŬROSCOLA aprile en Strasburgo, en Kroatia E-kongreso junie en Zabok kaj ĉeestis en NITOBE-simpozio en Vilnius.



**Peter Baláž, estrarano de EEU,**

Okupiĝis pri preparo de la filmado kaj filmado de materialo de DVD-filmo "Vizito al la Centra Oficejo", funkciigo kaj gvidado de Skype-kunsidoj ĉiumonataj de estraro, finpretigado kaj lanĉado de la hejm-paĝo de EEU: www.europo.eu.
Prezentis EEU ĉe "Mezeŭropa konsultiĝo" en Budapesxto, prizorgis la jahugrupon ĝenerala-asembleo-de-eeu@yahoogroups.com, verkis kelkajn artikolojn kaj tradukis. Preparis novan stampilon, logotipon kaj surgluaĵojn de EEU. Preparis (kolektis, enpaĝigis...) la Grin-leteron kaj UK invitilon al EU-parlamentanoj
Okupiĝis pri prezento de la filmo: "Vizito al la Centra Oficejo" kaj preparadoj de filmo "Kia estu Eŭropo". Ankaŭ informis pri EEU-kongreso dum Tutslovakia renkontiĝo, faris intervjueton por gazeto "Nieuw Rotterdam" ĉeestis ĉe la Nitobe-laborkunsido, plidensigo de kulaboro kun Nitobe-centro.

## FILMO »KIA POVUS ESTI EŬROPO?«

La centra kampanjo, kiun lanĉis ĉi-jare EEU estas produkti 20-minutan DVD-filmon sub la titolo »Kia povus esti Eŭropo«. La filmo havos subtitolojn en pluraj eŭropaj lingvoj (ni klopodos aranĝi tion en ĉiuj) kaj prezentos efektive la funkciadon de E-movado, kiu klare posedas sian propran kulturon, solidarecon, identecon kaj praktikan funkciadon, sed ĝi montros ke la apartenantoj de tiu nova fenomeno samtempe estas normalaj apartenantoj de siaj naciaj kulturoj kaj plenumas same konscie siajn taskojn en siaj naciaj kulturoj, amas siajn naciajn patrujojn kaj profunde sentas siajn naciajn identecojn. Tiel ni satus montri al EU-politikistoj, kaj la celo de la kampanjo estas produkti 2000 dvd-filmojn kaj distribui al ĉiuj EU-parlamentanoj, ke eblas evoluigi paralelan senton de nova (tuteŭropa) identeco kiu neniel ĝenas la ekzistantajn identecojn, sed simple nur aldoniĝas al ili, kondiĉe ke simbola rimedo por tiu nova identeco estas neŭtrala nova lingvo uzata nur en konstruo de tiu nova komuna identeco.
Ni volas montri ke tio jam ekzistas, kaj ke necesas nur iom da bona volo por simple apliki tion en eŭropunia spaco. Ni invitas vin helpi nian intencon produkti tiun filmon ĝis junio 2007 kaj tio eblos nur se vi aliĝos al la kampanjo per donaco de minimume 50 eŭroj. La filmo devas esti profesie farita kaj laŭ nia projekto ĝi kostos ĉirkaŭ 15.000 eŭrojn. Ĉiuj donacintoj ricevos adekvate al sia donaco kvanton da DVD-diskoj. La monon vi povas sendi al: konto eece-p ĉe UEA au rekte al la konto de EEU en Bruselo:
**en Belgio: 380-0098148-55**
**eksterlande: IBAN BE31 3800 0981 4855 ; BIC BBRUBEBB**.

## ETSUO MYOSHI



Japana industriisto, esperantisto kaj oomotano decidis antaŭ kelkaj jaroj dediĉi konstantan konsiderindan sumon ĉiujare por reklami Esperanton en Eŭropo, konvinkita ke en la nuna fazo de evoluo de Eŭropa Unio tio ĉi estas historie la plej konvena loko por penetrigi la ideon de neŭtrala internacia lingvo kaj ke tre gravas ke pri tio skribu renomaj grandgazetoj, kiujn politikistoj konsideras seriozaj kaj influpovaj. Post aperigo de deko da tutpaĝaj anoncoj en grandaj nacilingvaj ĵurnaloj, sinjoro Myoshi decidis koncentriĝi al franclingvaj eŭropaj landoj, do Francio kaj Belgio daŭrigante la anonckampanjon kaj aranĝante lunĉdiskutojn kun politikistoj okaze de iuj apartaj konvenaj datoj kia interalie estas la Tago de eŭropaj lingvoj. Post simila sukcesa aranĝo en Varsovio, ĉi-septembre okazos lunĉdiskuto kun franclingvaj politikistoj en Bruselo.

# 7-a KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO
# OKAZOS EN MARIBOR, SLOVENIO, DE LA 28-a DE JULIO ĜIS LA 4-a DE AŬGUSTO 2007

www.esperanto-marobor.si

Karaj esperantistoj,

Mi elkore invitas vin ĉiujn al la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor, Slovenio, de la 28.07-04.08.2007. Tio estas la unua fojo ke EEU-Kongreso okazas en unu el la "novaj EU-landoj", t.e. unu el la 10 landoj kiuj aliĝis al EU la 1-an de majo 2004. Pro tio, kaj pro la fakto ke Slovenio estas en la mezo de Eŭropo, kaj estas aparte bela lando, ni esperas bonvenigi vin amase en Maribor, kaj ne nur el Eŭropo sed el la tuta mondo, kiuj interesiĝas pri nia Eŭropo.

Kiel vi povas vidi en nia retejo www.esperanto-maribor.si, la kongreso enhavas multajn interesajn aranĝojn. Unufoje ni elektis nelingvan ĝeneralan temon por la Kongreso: "AKVO ". Ni havos prelegojn de fakuloj pri akvo kaj ekologio; filmojn pri marĉoj, birdoj, riveroj kaj slovenaj akvoj; prezenton de www.burger.si; kaj diskuton pri scienca terminologio en esperanto (biologio, ekologio, ktp.).

Sed ni ankaŭ ne forgesos niajn pli tradiciajn temojn, kiujn ni traktos sub la influo de la lando kie ni kongresos. Slovenio antaŭe estis parto de Jugoslavio, lando kies lingvaj spertoj povus multe helpi la embrian lingvopolitikon de EU. Do, estos konferenco pri »Kion lernu EU el jugoslavia lingva sperto«, kun 4-6 prelegoj de fakuloj kaj diskutoj. Ĉiu EEU-Kongreso aparte gravas por la evoluo de nia movado en Eŭropo, kaj do ne mankos la EEU-TEMOJ: Asembleo de EEU, Estrarkunvenoj de EEU, kaj Strategia forumo de EEU.

Ni havos riĉan kulturan programon, i.a koncerton de slovena koruso miksitan kun folklorajoj, filmojn, koncertojn kaj teatran vesperon. Fine, estos "Paralelaj programoj": "ĝangalo-babilejo", ĝardenistoj- esperantistoj, kurso de Esperanto por mariboranoj kaj kunuloj de partoprenantoj, fotoekspozicio, Esperanto-kulturo en urba biblioteko, kaj Esperantistoj prezentas siajn landojn kaj regionojn.

Vere estos io por ĉiu. Pro tio venu, kaj venu multnombre. Kune ni frandos neforgeseblajn tagojn en Maribor!

**Kuneŭropece via,, D-ro Seán Ó Riain,**
**prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio**

Karaj geamikoj,

Venontjare ni, esperantistoj, festos 120 jarojn de nia Internacia Lingvo. La feliĉan eventon ni festos en nia bela urbo Maribor (Slovenio) kun niaj geamikoj el tuta Eŭropo.

Tial tutkore ni invitas vin kune festi tiun jubileon dum la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto Unio. Aparte ni invitas junajn gesamideanojn, ĉar ili estas nia estonteco. En la kadro de nia kongreso okazos ankaŭ renkontiĝo de eŭropa junularo kun la programo preparita por gejunuloj (nokta universitato kiu inkludas banadon en termakva banloko, noktan ekskurson en montoj, diversaj koncertoj, spektakloj, kreivaj laborejoj, vizito de adrenalina parko ktp.). **Por vi, gejunuloj, estas senpaga aliĝo ĝis la fino de la jaro 2006**. Sincere ni esperas ke vi venos amase por plijunigi kaj plibeligi nian urbon.

La kongreso okazos dum someraj ferioj kaj tio certe ebligos al multaj niaj samideanoj partopreni tiun aranĝon. Estas antaŭvidita riĉa

programo por ĉiuj aĝoj kaj interesoj.

Bonvolu eluzi ŝancon viziti la proksiman kongresurbon kaj favorajn kondiĉojn. Ni ĝojos vidi vian amasan alvenon. Ĝustatempe ni komencis la preparojn

kaj ni esperas ke tio faciligos vian decidon. Venu, ni atendas vin.

**Nome de mariboraj esperantistoj, Vesna Obradović**



**MARIBOR** estas laŭ grandeco la dua urbo en Slovenio. Ĝi estas ekonomia, universitata, kultura, sporta kaj foira centro de nordorienta parto de la ŝtato. Situanta en la koro de Mezeŭropo, en la tranĉpunkto de gravaj transportaj vojoj, kiuj iras el meza al sudorienta Eŭropo kaj el okcidenta Eŭropo al Panonia malaltaĵo

En preskaŭ miljara periodo Maribor ĝisvivis progresojn kaj regresojn. Urbajn rajtojn ĝi ricevis en la 13-a jarcento. En malfrua mezepoko la urbo devis sin defendi, per fortaj muroj ĉirkaŭintaj la urbon, de Turkoj kiuj aspiris al centra Eŭropo. Restaĵoj de muroj estas bone konservitaj en Lent, malnova urboparto sur bordo de Drava.

Hodiaŭ Maribor estas urbo kun universitato, episkopsidejo, evoluinta kulturcentro kun teatro, opero kaj baleto, pluraj galerioj, muzeoj, koncertaj kaj kongresaj salonoj, komercaj centroj, internacia flughaveno, fama urba parko, sportaj objektoj, ktp.

Tial ĝi klopodas evoluigi kvalitan turismon kiu baziĝas antaŭ ĉio, sur kvalitaj vino kaj gastronomio. Ankaŭ sur bone konservita urbokerno, kiu reflektas pasintajn jarcentojn: gotikon sekvis renesanco, sed la plej profundan postsignon al la urbo lasis baroko. Pulso de la urbo respeguliĝas sur mariboraj placoj kaj stratoj. Aparte alloga estas Lent, malnova urba parto ĉe la bordo de Drava, kiu dum historio dividis la urbon, sed hodiaŭ forte ligas ĝin.

Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado

# ALIĜILO
**por 7-A KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO**
**EN MARIBOR, SLOVENIO**
**de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007.**

**Aliĝnumero** ______

**Kontaktoj:** **Esperanto societo Maribor**
**Maistrova ulica, 5**
**SI-2000 Maribor, Slovenio**
**fax:** **+386 2 252 33 96**
**e-mail:** eeu.kongreso@gmail.com
**url:** http://www.esperanto-maribor.si

**Ĉiu aliĝanto uzu apartan aliĝilon (fotokopion). Bonvolu tajpi aŭ skribi PRESLITERE, laŭbezone metu krucon en la koncernajn kvadratojn.**

**VIRO** □ **VIRINO** □
**FAMILIA NOMO:** ______
**PERSONA(J) NOMO(J):** ______
**NASKIĜDATO:** tago__ __ monato __ __ jaro__ __ __ __
**ADRESO, URBO KIAJ STRATO (*nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo*):** ______
______
**LANDO:** ______
**TELEFONNUMERO:** ______
**RETADRESO:** ______

□ Mi aliĝas kiel ĉefaliĝanto
□ Mi aliĝas kiel kunulo de ______
*(skribu la nomon de ĉefaliĝanto)*
□ Mi aliĝas kiel junul(in)o
□ Mi aliĝas kiel handikapulo, bonvolu sendi atestilon kun aliĝilo (skanita aŭ fakse)
□ Mi aliĝas senpage. Bonvolu skribi sube la kialon. Ankaŭ gejunuloj en la unua periodo de aliĝado, skribu tie la kialon, kaj menciu ke ili estas junul(in)oj.
Kialo: ______
□ Mi **ne volas** ke mia adreso aperu en la Kongresa libro

□ Mi pagis kotizon al **UEA konto** de la Kongreso (**euek-h**)
□ Mi pagis kotizon per kontanta mono al delegito, kiu reprezentas la Kongreson

**Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj kiujn mi tralegis.**
**MI LEGIS, KOMPRENAS KAJ AKCEPTAS KONDIĈOJN POR ALIĜI AL LA KONGRESO.**

**LOKO, DATO:** ______ **SUBSKRIBO:** ______

## INSTRUKCIOJ KAJ KONDIĈOJ

**Aliĝkategorioj:**
I Ĉefa aliĝinto estas persono kiu pagas kotizon sen rabatoj.
II Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto.
II Handikapulo: Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.
III Gejunuloj: naskiĝintaj inter 1.1.1982 kaj 31.12.1991 pagas kotizon laŭ supra tabelo. Oni nepre notu la naskiĝdaton en la aliĝilo.

**Senpage aliĝas:**
Infanoj naskiĝintaj post 31.12.1990; Nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj

**Kategorioj de landoj:**
A: Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Italio, Irlando, Islando, Luksemburgo, Nederlando, Norvegio, Portugalio, Svedio, Svislando, Usono, Kanado, Japanio, Aŭstralio, Novzelando, Suda Koreo, Suda Afriko, Israelo
B: Ciprio, Ĉehio, Estonio, Hungario, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Slovakio, Slovenio
C: ĉiuj aliaj
La landan kategorion difinas lando de loĝado.

**KOTIZOJ**

| KATEGORIO | ĝis la 31-a de decembro 2006 | | | ĝis la 30-a de aprilo 2007 | | | ekde la 1-a de majo 2007 | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | A | B | C | A | B | C | A | B | C |
| I | 80 | 60 | 40 | 100 | 75 | 50 | 120 | 90 | 60 |
| II | 50 | 35 | 25 | 60 | 45 | 30 | 80 | 60 | 40 |
| III | 0 | 0 | 0 | 50 | 35 | 25 | 60 | 45 | 30 |

**ATENTON**
**Ĉiuj kiuj bezonas invitleteron** pagas 12 eŭrojn kune kun la kotizo kaj devas sendi pasportajn datumojn ĝis la 31-a de marto 2007. Post la limdato ni ne certas ke vi ricevos slovenan vizon ĝustatempe.
Grupoj de esperantistoj povas ricevi grupan invitleteron (ĝis 10 personoj) kontraŭ 60 eŭroj.
Vi povas aliĝi rete, aŭ sendi vian aliĝilon fakse: (faksnumero +386 2 252 33 96 ) aŭ poŝte al nia adreso:
**Esperanto societo Maribor; Maistrova ulica 5; SI-2000 Maribor, Slovenio**
**Aliĝilojn kaj pagojn al UEA konto (euek-h) eblas sendi ĝis la 15-a de junio 2007. Post tiu dato eblas aliĝi nur surloke. En tiu kazo kotizoj estos 10% pli altaj ol en la tria periodo.**
La kotizo **ne estas** repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝanto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazos, aŭ okazos en alia urbo.
La kotizo **ne inkluzivas** loĝadon, ekskursojn kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.
**Kongresaneco estas transdonebla al alia persono**. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

**Loĝado** dum kongreso estas organizita en Studenta domo tranokto kun matenmanĝo kostas inter 18 kaj 23 eŭroj, kaj en hoteloj, kie kostas inter 29(***) kaj 118 (*****) eŭroj. Ĉambromendilo estas atingebla ĉe www.esperanto-maribor.si, aŭ ĉe delegitoj, kiuj reprezentas la Kongreson.
Okazos du **antaŭkongresoj**;**"Montoj kaj akvo"** (en alpa regiono) kaj **"Iomete alie"** (en karsta regiono). La duan ni rekomendas por birdemuloj kaj naturemuloj;
kaj du **postkongresoj** : **"Ripoza semajno"** kaj **"Adrenalina semajno".**
Menciitaj aranĝoj kaj dumkongresaj ekskursoj donas eblecon bone ekkoni nian landon.
**Bonvenon!**